
# Aŭstraliaj Esperantistoj



## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 16/06/2022 Kvincentokdeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greenvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*


*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 721,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **171,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **151,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **100,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj. Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*




la [esperanta retradio](#)



**Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan**

**Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.**

**LA UNUA PERSONA KOMPUTILO EN LA MONDO**

**8A JUNIO 2022**

# Du ekonomiaj sistemoj batalas

Milite. Ekonomie. Propagande. Mensoge

Usono verŝajne perdis sian alilokan militon

la-granda-ukrainujo-kulpigo-ludo-komencis

Ne ĉagreniĝu, baldaŭ la vero sin montros (Inter la mensogoj) *Roger Springer*

**La granda senrespondeca ludo ekas.**




https://thesaker.is/gonzalo-lira-the-great-ukraine-blame-game-has-begun/



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 18a de junio estos la unua sabato Venu ! *Roger Springer*

La sukceso de milito dependas de kiuj mortigis la plej multajn homojn. Mi kredas ke soldatoj estas homoj ne peonoj. Detruitaj militaj aviadiloj ktp ankaŭ enhavas homojn Mi scias ke la plej multaj soldatiĝis pro la salajro, ne por militi. Devigitaj soldatoj estas peonoj. Bedaŭrinde multaj homoj kiuj estas la herooj dum milito estas tiuj, kiuj ŝatas la eblecon ĉasi kaj mortigi homojn.

*Roger Springer* **Esperantistoj ŝatas pacon kaj ne militon**



Kun karoto en la dekstra orelo, kukumo en la maldekstra orelo kaj banano en la nazo venis Trevor al sia kuracisto.



“Doktoro, doktoro, mi ne fartas bone, kio malĝustas pri mi?”
“Tre simple” diris la kuracisto. “Vi ne manĝas bone!” *Bob Felby*

WORLDBEYONDWAR.org
a global movement to end all wars

PRI SIGNO EDUKADO AKTIVISMO RIMEDOJ DONACI BUTIKO EVENTOJ

# Centoj da Protestantoj, Blokitaj Enirejoj al la Plej Granda Armila Foiro de Nordameriko

KANADO, NEPERFORTA AKTIVISMO, NORDAMERIKO




rilataj Artikoloj

Du mondoj koliziis. Ĉu io ŝanĝiĝis / Deux mondes se heurtent… quelque chose a changé?



## Ĝismorta ŝerco

Leginte la rakontojn de Marcel kaj Franciska, mi memoris iom similan situacion el mia juninstruista vivo. Mi laboris en Aramac, eteta vilaĝo en la geografia mezo de Kvinslando. Estis teamo da viroj, kiuj serĉis nafton en la regiono, kaj ĉiun duan semajnon tiuj viroj venis al Aramac manĝegi, seksumi, kaj antaŭ ĉio drinki.

Inter ili estis naiva junulo, eble deksepjara, el Sidnejo, kiu sopiris esti akceptita kiel "unu el la teamo". La ceteraj ofte blagis kaj amuziĝis pri la naivulo.



Iun vesperon la tuta grupo estis en drinkejo, kaj iu defiis la junulon. La defio: ke li ne povas per unu gluto trinki tutan botelon da viskio. Se li sukcesos, oni donos al li du ŝilingojn. La knabo sukcesis, gajnis la vastan monsumon, kaj mortis kelkajn horojn poste. *Trevor Steele*

## El AE332

Mi volas iom komenti pri la artikolero de Marcel en la lasta AE331.

## Trevor Steele Iom pri la politiko de Ruslando/Ukrainio

Miĥajl Gorbaĉov ne donis Krimeon al Ukrainio, kaj Gorbaĉov ne estis ukraino (li naskiĝis en Stavropol en suda Ruslando). En 1954 Nikita Ĥruŝĉov, kiu fakte estis ukraindevena, kaj unue “eminentiĝis” kiel la ĉefa persekutanto de ukrainaj kamparuloj en la malhumana kampanjo de Stalin devigi kolektiviĝon de ĉiuj bienoj, aljuĝis la (ruslingvan) duoninsulon Krimeo al la “Ukraina Soveta Socialista Respubliko”. Kial? Kelkaj diras, ke li estis tiumomente ebria. Pli probable li volis provi aĉeti la lojalecon de ukrainoj al USSR. Mi mem spertis en 1990-1991 la streĉitecojn en Ukrainio, parte pro tio, ke la homoj en la okcidenta parto parolas ukraine, dum la urbanoj oriente parolas ruse. Eĉ tiam mi antaŭvidis “problemojn”, se Sovetunio disfalos kaj Ukrainio sendependiĝos. *Trevor Steele* 27/07/2017

# TIO KIO SUPRENIĜAS ANKAŬ POVAS MALSUPRENIGI!


Kiam oni starigis anonctabulon ĉe la domo malantaŭ la mia, informante, ke konstruiĝos tie supra etaĝo, mia koro misbatis!

Mi kontaktis mian lokan konsilantaron por peti informon pri la konstruo-plano, sed venis rifuzo pro tio, ke la laŭleĝa distanco-postulo de 7 metroj estis plenumita.

Dum unu tago la ekzistantaj tegmento-tegoloj estis forigitaj kaj la pretkonstruita supra etaĝo alvenis en pecoj. Enorma argano atendis por suprenigi la diversajn partojn, pecegon post pecego.

La konstruaĵo aspektas bonege, sed ho ve, ĝi ŝtelis de mi la matenan sunon, kaj la novaj balkono kaj fenestroj superrigardas mian domon kaj longan verandon.


Do, post nur 24 horoj, la valoro de la najbara domo pligrandiĝis, dum la valoro de mia domo malgrandiĝis. Kie estas la justeco?



Tradukis Vera Payne *TrishO'Connor*

Saluton Roger!

Grandan dankon pro daŭra sendado de AE, kiun mi ĉiam legas avide. Tamen tiu karto sendita de Vera aparte meritas mencion je ĉi tiu momento, kaj la bela bildo kun kolombogutoj de Esperanto. Vidu AE586



Amike, Jennifer Bishop

# Karaj kontribuantoj. Sen vi, AE ne povas ekzisti

*Merkredvespere mi sendas la novaĵleteron al la provlegantino por kontroli la lingvon kaj elsendas al la legantoj dum ĵaŭdo. Uzu ĝin por la reklamo de viaj semajnfinaj eventoj. Poste informu pri la sukcesoj de viaj kunvenoj en la sekvanta "Aŭstraliaj Esperantistoj" por montri ke viaj kluboj ekzistas kaj aktivas.*



***Se oni ne sendas informon al AE, tiu novaĵo ne povas aperi en AE***

**3ZZZ......** En la elsendo de la 13a de junio troviĝas informoj pri politika situacio (portreto de Frank-Walter Steinmeier, Svislando sen armeo) kaj pri homa bonfarto ( MC5 kvinkontinenta masaĝo , graveco de flarkapablo)

Lundon la 20an de junio je la 2.30 okazos en la radiostacio en Brunswick la jarkunveno de la Esperanta grupo. Se vi estas membro loĝanta en Melburno nepre venu. Eblas sendi viajn rimarkojn, ideojn per retpoŝto je la adreso 3zzzesperanto @gmail.com. *Franciska Toubale*

